

Pli ol 5 mil instruistoj esprimis sian volon reveni al la klaso?ambroj



Havano, 18 jul (RHK) Ena Elsa Velázquez, ministrino pri edukado, sciigis per la socia reto Twitter, ke post la sciigo pri la salajra altigo en la subvenciata sektoro, pli ol 5 mil instruistoj petis reani?i al la laboro en klaso?ambroj.

?i sciigis ke “la petoj okazas en la municipaj organoj de edukado. Ke instruistoj spertaj kaj kvalite laborpretaj reani?u, favorigas la docentan anaron, ?i aldonis.

La informo estis amplekse komentita en ciferecaj komunikiloj kaj ?enerale oni taksas tion kiel bona nova?o, kaj estas “ta?ga respondo de la instruistoj al la kura?a decido adoptita de la registaro kaj la Revolucio,” raportas la gazeto Granma.

La docenta anaro estas temo ?iam prioritata de la ministerio pri edukado. La pasintan junion, la doktorino Velázquez-Cobiella, anoncis ke la 94% de la bezonoj pri instruistoj estis certigitaj.

La ceteraj bezonoj estus kovritaj per instruistoj dungotaj per kontraktoj, kaj aliaj laborantaj en aliaj sektoroj, plus help-lernantoj.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/196455-pli-ol-5-mil-instruistoj-esprimis-sian-volon-reveni-al-la-klasocambroj>



Radio Habana Cuba